

NIA PONTO

Grupo Esperantista

Barrencalle Barrena, 7- 1ª deksstre

48005-BILBAO (Hispanio)

Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jesusmiguel.garcia@ehu.es)

TTT-ejo: esperantobilbao.tk

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)

☎ 619.694.683 (Iciar)

☎ 658.709.087 (Jesús)

💻 esperantobi@gmail.com

Jar-kotizoj: Normala: 30 €. Speciala: 15 €. Familia: 45 €.

BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550

MAJO/OKTOBRO 2013

Nro. 96 (3/13)



Esperanto-Grupo



www.esperanto.net

Barrencalle Barrena, 7 - 1.º • Tfno. 658 70 90 87
48005 BILBAO

Nacia Loterio N° 75.265

La posedanto de tiu ĉi kvitanco partoprenas, per kvar (4,00) eŭroj, la numeron kies lotado okazos en Madrido la 22-an de Decembro 2013.

4,00 eŭroj
(MON-DONACO: + 1,00 €)

0001

Senvalora post 3 monatoj. Caduca a los 3 meses. 3 hilabeteren ondoren, baliorik gabea

Jen denove la tradiciaj kvitancoj por la kristnaska loterio. Ili aĉeteblas en nia sidejo aŭ pere de interreto: vi devas nur sendi retmesaĝon al esperantobi@gmail.com kaj enkontigi la monon; tuj ni sendos al vi, ankaŭ per retmesaĝo, la kvitancojn reervitaj por vi.

La Navidad se aproxima y ya tenemos preparados los tradicionales boletos de lotería. Se pueden comprar ya en el Grupo o por internet: basta con enviar en e-mail a esperantobi@gmail.com e ingresar el dinero en la cuenta del Grupo; rápidamente, enviaremos los recibos, también por e-mail.

LOKE ...

ESPERANTAJ KONGRESOJ.



Hispana kongreso en Zaragoza.
La 4 bilbaoanoj, kiuj ĝin partoprenis, antaŭ la fama baziliko "El Pilar".



En la luksega Montekarlo, dum la itala kongreso

NASKIĜTAGO DE LA E-GRUPO.



Kiel anoncite, la pasintan 18-an de majo, ni okazigis la jam tradician komunan tagmanĝon por celebri la fondotagon de la E-Grupo de Bilbao (la 20-an de majo Ĝi aĝis 107 jarojn).

Naŭ homoj kuraĝis veni al restoracio “Adrián” en Repélega (Portugalete). Post la tagmanĝo en ege agrabla kaj amika etoso, ni daŭrigis la babiladon ĉe la ne malproksima loĝejo de tiea esperantisto. Ĝis la venonta jaro! ...

FINO DE E-KURSO.

Kun la fino de majo ankaŭ alvenis fino por la elementa E-kurso lerte gvidata de nia amiko Pako López en la Grup-sidejo. Ĝi disvolviĝis en la vaska/eŭska lingvo (kaj en Esperanto ... Kompreneble!).

EŬSKA LITERATURO EN ESPERANTO.

La Libroservo de UEA ĵus anoncis la aperon de tri libroj tradukitaj el la eŭska lingvo al Esperanto:

- Klaŭda kaj la rivera sekreto, Aitor Arana, Simplaj legaĵoj kaj infanlibroj, Erroteta, 2013. Rakonto pri knabino, kiu volas ludi futbalon en epoko, en kiu tio ne eblas, nur ĉar ŝi estas knabino. Prezo: 9.90 EUR. Pliaj informoj, reta mendilo: <http://katalogo.uea.org?inf=9003>
- Ĉapulo la fantomo, Mariasun Land, Simplaj legaĵoj kaj infanlibroj, Erroteta, 2013. Rakonto pri fantometo, kiu pretas helpi knabinon, kiu ne bonsanas. Prezo: 9.90 EUR. Pliaj informoj, reta mendilo: <http://katalogo.uea.org?inf=9004>
- Knabo en Marso, Iñaki Zubeldia, Simplaj legaĵoj kaj infanlibroj, Erroteta, 2013. La unua porinfana sciencfikcia rakonto en la eŭska lingvo. Prezo: 9.90 EUR. Pliaj informoj, reta mendilo: <http://katalogo.uea.org?inf=9005>

(Darío Rodríguez. 05/10/2013)

KONGRESO DE SAT.

Inter la 28^a de julio kaj 4a de aŭgusto disvolviĝis en Madrido la kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda. Ĝin organizis la asocio SAT-en-Hispanio (SATEH), sub ĉefa kunordigo de Pedro Sanz kaj José M^a Salguero (Kani).

La kongreson partoprenis ĉirkaŭ cent aliĝintoj, el ĉiuj kvin mondaj kontinentoj, plus diversaj aliaj homoj kiuj ĉeestis diversajn programerojn, danke al la malferma karaktero de la evento.

Dum matenoj okazis ĝenerale kunvenoj de SAT kaj ties rondoj, frakcioj kaj fakoj. Vespere oni organizis plurajn prelegojn, inter ili de madridaj esperantistoj Miguel Fernández, Jorge Camacho, Manolo Pancorbo, Pedro Zurita, Félix Jiménez Lobo, Toño del Barrio, sed ankaŭ de vizitantoj, kaj eĉ de neesperantistoj, kiuj foje sin esprimis parte en Esperanto aŭ profitis je la sinsekva interpretado de Jorge Camacho.

Oni povis ĝui koncerton de JoMo, partopreni duan version de la spektaklo "Vivu la teatro!" aŭ spekti filmojn, kiel la mallongan "Mondcivitanoj", kun partopreno de Pedro Sanz, aŭ la de SAT produktitan "Esperanto", kiun MEL baldaŭ montros en interna kunveno. Estis prezentitaj krome pluraj libroj ĵus eldonitaj.

Dum la kongreso, kun kunlaboro de HEF kaj MEL, estis organizita ekspozicio, kurso de Esperanto kaj publika prezentado de la lingvo en la hispana. Ampleksa Libroservo estis je ĉies dispono dum tiuj tagoj.

Oni ekskursis trifoje en Madrido mem. Por la unua ekskurso tra Madrido oni eliris el la Sunporda Placo (Puerta del Sol), kaj vizitis la centrajn vidindaĵojn, ĝis Tirso de Molina (kie okazis akceptado ĉe sindikatejo de CNT). La dua ekskurso tra Madrido komenciĝis kiel omaĝo ĉe la statua monumento al advokatoj de Atoĉa, kun kanto kaj oferdono de po unu dianto fare de reprezentantoj de la kvin kontinentoj; poste oni vizitis aliajn lokojn de la urbocentro. La tria ekskurso tra Madrido komenciĝis ĉe placo Cibeles al Pordego Alkalao, tra Parko Retiro (baseno, promenejo Kubo ĝis la statuo de la Diablo). Tuttaga dumkongresa ekskurso celis al Toledo. Post la kongreso estis organizitaj pliaj ekskursoj dum tri tagoj, respektive al la nordo de madrida regiono, al Segovio kaj al Avilo.

("Nia Voĉo", órgano de Madrida E-Liceo. Septembro 2013)

ELDONITA LIBRO "Poezio: armilo ŝargita per futuro".

Dum la SAT-kongreso estis prezentita la eldono de literatura antologio "Poezio: armilo ŝargita per futuro", kiun formas verkoj el la engaĝita, progresema, plejofte politikrevolucia poezio ĉefe el hispania deveno. Ĝin eldonis la asocio SAT-en-Hispanio, kaj la baza kompilinto kaj tradukinto estas la iberskola poeto Miguel Fernández. La libro enhavas pecojn de Federico García Lorca, Rafael Alberti kaj aliaj verkistoj de la t.n. Generacio de 1927, kaj ankaŭ postaj poetoj kiel Miguel Hernández, León Felipe aŭ Gabriel Celaya, el unu el kies versoj estas elprenata la titolo.

La verko ja estas impona, kun pluraj centoj da poemoj, kaj klarigaj notoj kaj enkonduko. Ĝi estas aĉetebla en la madrida sidejo.

("Nia Voĉo", órgano de Madrida E-Liceo. Septembro 2013)

RENOVIGO EN LA RETEJO DE HEF.

La retpaĝaro de Hispana Esperanto-Federacio spertas dum tiu ĉi periodo rimarkindan renovigon. Post translokigo de servilo, komence de somero, al alia kun pli granda amplekso kaj kapablo, en septembro ŝanĝiĝis la baza ŝablono de la retejo. Kvankam la aspekto ne estas tro malsama disde la antaŭa, ĉefa trajto estas ke la nova ŝablono estas pli adaptita al porteblaj telefonoj kaj tabulkomputiloj, kaj pli simpla.

Fine de septembro oni atingis novan mejloŝtonon: la plurlingvigon de la retejo, kiu nun disponas de diversa materialo pri Esperanto kaj la asocio en kataluna, galega kaj **eŭska** lingvoj.

Dum venontaj semajnoj oni funkciigos internan spacon por membroj de la asocio. Ankaŭ okazos modifoj en la specialaj paĝoj gastigataj en esperanto.es, kiel tiuj de lokaj asocioj kaj de la hispana junula societo.

(“Nia Voĉo”, órgano de Madrida E-Liceo. Oktobro 2013)

NOVA FILMO.

Tiu ĉi ligo havas interesan informon. Nome, ŝajnas ke oni kreis produktan kompanion, nomatan "Esperanto Kino", por filmo de la filo de Alfonso Cuarón. Sed memoru ke la kompanio de Cuarón patro mem nomiĝas "Esperanto Filmoj". Kaj ke li nomis ĝin tiel pro lia simpatio al Esperanto:

<http://www.esperanto.es/hef/index.php/sala-de-prensa/noticias/35-noticias-espanol/articulo/198-cuaron>

Tiu malnova kompanio denove aperas nun en la komunikiloj, ĉar ĝi partoprenas en filmo, kiu ĵus inaŭguris la festivalon de Venecio: "Gravity", kun George Clooney kaj Sandra Bullock. Do, eĉ se la kompanioj estas malsamaj, la ligo al Esperanto plu restas. (Venontfoje ni simple konvinku la familion ke la filmo estu registrata en Esperanto, kaj la fina venko venos kiam Clooney parolos en nia lingvo)

(Toño del Barrio. 30/08/2013)

lom da historio...

Trajo de cabeza al fascismo y al estalinismo, fue motivo de persecución y estuvo a punto de derribar al inglés como la lengua más utilizada de manera internacional: es el esperanto.

Todos tenemos una vaga idea de lo que es este idioma, pero pocos conocemos los auténticos detalles que rodearon el alumbramiento y tortuoso recorrido del mismo. Sabemos que era algo así como una lengua surgida de la mezcla de otras y que su principal objetivo era ser utilizada en las conversaciones mantenidas entre ciudadanos pertenecientes a países diferentes. También, que nunca llegó a implantarse del todo y que ha quedado para la posteridad como poco más que una curiosidad pintoresca. Lo que muchos no conocen es **el papel que dicha lengua artificial tuvo durante la primera mitad del siglo XX en la vida de colectivos como la clase obrera o los judíos.**

Adolf Hitler y **Josef Stalin** detestaron y persiguieron dicho idioma. En su obra señera, *Mein Kampf* (*Mi lucha*, 1925), Hitler calificaba el esperanto como **la**

lengua que los judíos utilizarían en su conspiración para dominar el mundo, y cuyo uso impondrían si conseguían salirse con la suya. En sus discursos, el esperanto era una de sus víctimas habituales. **Heinrich Himmler**, comandante en jefe de las SS, pidió la disolución de las organizaciones esperantistas en 1936 y el partido nazi prohibió su uso poco después.

Seguramente, gran parte del odio del *führer* hacia este idioma se debiese al origen judío de su inventor, el polaco **Lázaro Zamenhof**, que la alumbró en 1887 después de observar cómo las diferencias idiomáticas en su Bialystok natal causaban importantes conflictos sociales. El nombre de “esperanto” se tomó del apodo que utilizaba Zamenhof para escribir sus libros, y que era precisamente el de “Doctor Esperanto”. De hecho, **los tres hijos de Zamenhof, Adam, Sofia y Lidia, murieron durante el Holocausto**. Lidia se había dedicado a ahondar en el trabajo de su padre antes de morir.

Stalin, por su parte, llegó a calificar el esperanto como “**un nido de espías y cosmopolitas**”. Sin embargo, el esperanto nunca tuvo vocación de “conquistar” idiomáticamente a nadie, sino de servir de lengua auxiliar y secundaria. Durante el nazismo, también tuvo una función muy útil: sirvió para que aquellos miembros de la resistencia que la conocían y procedían de diferentes países pudiesen organizarse. Es la historia, por ejemplo, de **Valdemar Langlet**, publicador sueco y uno de los grandes defensores del esperanto en la época, que había aprendido en 1890, lo que le permitió durante el Holocausto salvar a un gran número de judíos.

Un último detalle que muestra esta complicada convivencia entre esperanto y nazismo: en *El gran dictador*, la película de **Charles Chaplin** que denunciaba (y parodiaba) el nazismo, **gran parte de los carteles que conforman la decoración del gueto judío** están escritos en esperanto. Era la mejor forma de reflejar la persecución a la que estaban siendo sometidos sus defensores durante el nazismo.

Auge y caída del esperanto.

Es difícil, hoy en día, pensar en la importancia que pudo tener el esperanto durante aquellos años, pero llegó a gozar de una gran difusión. Especialmente entre **círculos anarquistas** que, por su internacionalismo, adoptaron el esperanto como herramienta de comunicación. Hoy en día, se estima que hasta dos millones habitantes del planeta pueden conocer este idioma, y siguen realizándose congresos en todo el mundo, así como publicando periódicos y libros escritos en dicha lengua. Fueron acontecimientos como la persecución nazi, pero también la inestabilidad política de los años treinta (fue una lengua perseguida por varios regímenes totalitarios), los que **frenaron su crecimiento** e impidieron que el sueño de Lázaro Zamenhof se cumpliera.

La Edad de Oro del esperantismo suele situarse entre finales de los años veinte y comienzos de los treinta. El esperanto fue utilizado con regularidad por anarquistas desde el momento de su alumbramiento. **León Tolstói**, una figura muy influyente para el pensamiento anarquista, defendió su uso, que se extendió rápidamente en Rusia. Sin embargo, a finales del siglo XIX, la lengua fue censurada por el régimen zarista, que prohibió el único periódico que se redactaba en dicha lengua. Poco después, Francia tomaría su relevo como la plaza en la que se

concentrarían la mayor parte de teóricos y hablantes del esperanto, y desde allí se extendió a Japón y China. Poco a poco, el empleo del idioma se extendió gracias a organizaciones como la *Universala Esperanto-Asocio* (que aún sigue vigente). **En 1922, fue adoptado como la Lengua Auxiliar Internacional**, y se empezó a hablar en Hungría (donde se fundó la llamada Escuela de Budapest), República Checa y otros países continentales.

La Edad de Oro del esperantismo suele situarse entre finales de los años veinte y comienzos de los treinta, justo inmediatamente antes del ascenso de los totalitarismos europeos: el esperanto tiene el honor de haber sido **la lengua que más rápido se ha extendido de la historia**. Sin embargo, el esperanto pronto se encontró con un difícil competidor: el inglés, que especialmente a partir del final de la Segunda Guerra Mundial comenzó a convertirse en lo que realmente debía haber sido el esperanto, es decir, la lengua “neutra” de uso internacional. La importancia del esperanto quedó reducida a la mínima expresión, por mucho que la UNESCO haya reconocido en repetidas ocasiones su validez y anime a los gobiernos a emplearla con regularidad. Una de las editoriales más señeras del esperanto es *Stafeto*, que fue fundada durante los años cincuenta en La Laguna (Tenerife).

El esperanto en Estados Unidos.

Nos encontramos en los Estados Unidos del *american way of life*. Son los años cincuenta y el rápido crecimiento económico ha permitido que ya se haya olvidado la Segunda Guerra Mundial y se encare una nueva era donde el enemigo es el bloque comunista. Es en ese momento cuando el esperanto vuelve a hacer acto de presencia en el mundo militar jugando un rol no tan diferente al que había adoptado durante la persecución del nazismo: se trataba, una vez más, de **la lengua que hablaba el enemigo**.

¿En qué consistía exactamente esta utilización del esperanto? Básicamente, en ser utilizado durante las prácticas de combate como aquel idioma que debía emplear el bando enemigo para conferir **un mayor realismo a los ejercicios de campo**. Existe un manual de campo publicado por el departamento de ejército de Washington en 1962 que, bajo el nombre de “The aggressor language” (“El lenguaje del agresor”), incluía una completa gramática y vocabulario de dicha lengua. No se debe entender el “aggressor” como un término peyorativo, sinónimo de “agresor”, sino que es la palabra que se usa para definir a los ejércitos entrenados para adoptar el papel del enemigo durante las maniobras. En el siguiente vídeo del ejército se puede ver qué rol jugaba el esperanto.

Resulta curioso reparar en que dicho manual de campo comienza dejando claro que “el esperanto no es una lengua muerta o artificial”, sino que la define como **“un medio de comunicación oral y escrita viviente y actual”**. Además, el documento señalaba que la razón por la que este idioma había sido seleccionado para definir al “agresor” no era porque fuese utilizado por el enemigo, sino por “su sabor internacional”. El texto elogiaba el carácter “viviente” de dicha lengua, ya que, como aseguraba, podía integrar continuamente nuevas palabras. Como aún sigue haciendo, más de 120 años después de su creación.

(*Journal “El Confidencial”*. 26/06/2013)

UNIVERSALA KONGRESO.

Pli ol milo da esperantistoj partoprenis en Rejkjaviko (Islando) en la 98a Universala Kongreso, inter la 20a kaj 27a de julio. Nome de esperantistoj el Hispanio salutis la kongreson la vicprezidanto de HEF, Ángel Arquillos, kiu ankaŭ reprezentis la asocion en la kunvenoj de la komitato de UEA. Dum la kongreso oni renovigis la estraron de UEA. Nova prezidanto fariĝis Mark Fettes.

REZULTOJ DE LA LASTATEMPAJ U.K.

La UK-oj en Kopenhago kaj Hanojo estis deficitaj, ĉar la nombroj de aliĝintoj restis malpli altaj ol necesis por ekvilibra financa rezulto. Depende de la kotizgrupoj, en Kopenhago "mankis" 300-400 kaj en Hanojo 150-200 kongresanoj. La rezulto de Rejkjaviko siavice estos pozitiva, sed ankoraŭ estas tro frue por paroli pli precize.

(Osma Buller, ĝenerala sekretario de UEA. 04/10/2013)

Unu miliono da eŭroj por tri projektoj de E@I

La teamo de E@I krom poresperanta agado okupiĝas ankaŭ pri EU-projektoj (ĉefe lingvoinstruaj). Ankaŭ ĉi-jare E@I sendis plurajn projekt-proponojn al la agentejo EACEA en Bruselo. En julio venis la respondo: el ĉiuj proponitaj projektoj estis aprobitaj tri, en kiuj E@I estas envolvita. Unu projekton E@I mem kunordigos, en la du aliaj ĝi estos partnero. Temas pri kreado de multmediaj multlingvaj retkursoj en la stilo de lernu.net.

La unua projekto (kiun E@I mem kunordigos) estas daŭrigo de la retejo www.slovaque.eu. EU subtenos ĝian evoluigon per 398 mil eŭroj. Pri la projekto laboros 9 partneroj el 7 landoj. Nova paŝo inkluzivos kreadon de kursoj por progresantoj en niveloj B1 kaj B2 laŭ KER, aldonajn tradukojn al la rusa, hungara kaj kroata lingvoj, kreadon de poŝtelefonaj aplikaĵoj, mediateko ktp.

La dua projekto, subtenita de EU, estas destinita por lingvo najbara al la slovaka – la ĉeĥa. La monpeton por ĝi sendis la lingva centro de la Universitato Masaryk en Brno (Ĉeĥio), en kiu nun laboras E@I-estrarano Marek Blahuš. La universitato pretigis la projekton surbaze de la pozitiva sperto en la kunlaboro kun E@I pri la projekto www.deutsch.info, kie la lingva centro estas partnero. Krome la centro helpis traduki la retejon slovaque.eu al la ĉeĥa lingvo, kaj post tio ekestis ideo krei similan projekton por la propra lingvo. La projekto por la ĉeĥa lingvo estos same multlingva kurso, kun aldona specialiĝo pli altnivela pri la medicina lingvaĵo (en la universitato studas pluraj estontaj kuracistoj). La projekto ricevos subtenon de 240 mil eŭroj.

La tria projekto estas nelingva – “Cybermobbing” (Kibernetika/Interreta ĉikanado). Dum du jaroj necesos krei multlingvan kurson/retejon kun la instrukcioj, informoj kaj atentigoj pri la danĝeroj de la cifereca mondo al la infanoj kaj adoleskuloj. Por la projekto oni disponigos 400 mil eŭrojn. La projekto tute bone eniras la agadkampon de E@I, kiu specialiĝas ĝuste pri “Edukado ĉe Interreto” – do eduki junularon pri la danĝeroj de interreto (kaj pri homoj kiuj misuzas ĝin) estas tre taŭga kaj tre aktuala projekto en la nuna mondo. *(Peter Baláž, E@I-kunordiganto. 21/08/2013).*